

**Alphonse CARLES**

# **KURLUDOJ DE TOROJ**

**Dediĉita al Sinjoroj**

**H.Hodler kaj Th. ROUSSEAU**

*miaj unuaj kaj bonegaj kolegoj en U. E. A.*

**A. CARLES.** *Komitatano de U. E. A.  
sekretario de la Esperanta Klubo de Béziers*

Prezo : Fr. 0,75

**1909**

PARIS

LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO  
15, rue Montmartre



**Alphonse CARLES (1867 - 1929)**

# KURLUDO DE TOROJ

De kelka tempo la toraj kurludoj\* (1) laŭ la hispana maniero, multe disvastiĝis en la sudo de Franclando. ;

Tiun ĉi ludon, tamen, oni multe kontraŭbatalis, tuj post ĝia apero. Multaj el la francaj gazetoj, precipe la Parizaj, kontraŭstaris por ĝin malaperigi, pretekstante ke ĝi estas kruela kaj neinda je civilizita popolo.

Malgraŭ tio, la Suduloj persistis ; la toromakio\* rapide progresis tie kaj nun la kurludoj laŭ la franca maniero estas preskaŭ forlasitaj kaj anstataŭitaj de la kurludoj\* kun mortigo de la toro\* laŭ la hispana maniero.

Kelkaj urboj : Nîmes, Arles, Bayonne, Béziers, k. t. p. havas tre belajn arenojn, en kiuj oni donas tiujn ĉi prezentadojn kun granda lukso kaj soleneco. Tien alvenas granda popolamaso de la urbo kaj de la ĉirkaŭaĵo, por aplaŭdi (... aŭ fajfi) la hispanajn majstrojn

(1) *Oni trovos en la leksikono ĉiujn vortojn sekvatajn de steleto.*

## 1 - PRISKRIBO DE HISPANA KURLUDO

laŭ la reguloj ĉie akceptitaj (2)

(2) *Ni povus montri la tutan regularon hispanan, sed ĝi estas longa kaj pritraktas eĉ malgravajn aferojn, kiuj tute ne intereŝus la legantojn. La priskribo de kurludo entenata en tiu ĉi libreto kun la klarigoj de la leksikono, sufiĉos por doni plenan sciadon.*

### ORGANIZADO DE TORA KURLUDO

La organizado de kurludo kun mortigo, tia kia ĝi devas fariĝi — por ne riski malsukceson — ne estas malgranda entrepreno. Oni devas unue agi laŭ la reguloj (kiuj estas severaj kaj multenombraj) koncernantaj : la torojn (pri la pezo, la aĝo, la forto), la kvadrelojn\* (pri la plennombreco kaj diversaj aliaj aferoj) la pikadorajn\* ĉevalojn, kaj la tutan servantaron.

Ĉio entute kostas ne malpli ol dudek-kvin aŭ tridek mil frankojn (Sm. 10,000 aŭ 12,000) kiujn la organizanto riskas laŭ la stato de la vetero aŭ malhelpaĵo trafinta en la lasta momento unu el tiuj potenculoj, kiujn oni nomas matadoroj\* aŭ spadistoj\*.

La kurludo enhavas regule almenaŭ du kvadrelojn, kiuj devas batali intersekve, ĉiu po tri toroj, entute ses torojn. Ĉiu kvadrello havas kiel estron unu matadoron. kartelan\*. La matadoro formas sian kvadrelon, kaj traktas kun la organizanto pri la kondiĉoj, salajroj, k. t. p. Senutile estas diri ke tiu ĉi salajro estas ĉiam tre alta kaj ke la plej granda parto estas prenata de la matadoro mem. Oni pagas ordinare bonan matadoron kaj lian kvadrelon: tri aŭ kvar mil frankojn (1,200 — 1,600 Sm.), sed tia majstro kia Guerrita (1) gajnas ordinare almenaŭ sep aŭ ok mil frankojn (2,800 aŭ 3,200 Sm.) por ĉiu kurludo.

(1) *Guerrita ankoraŭ vivas. sed li tondigis “sian pendtufon\*”.*

Estas vere, ke la anonco ke iu fama matadoro, kies nomo brilas sur la muraj afiŝoj, batalos kontraŭ toroj, sufiĉas por allogi popolamason, kiu alkuras je la montrita tago kaj plenigas la vastajn arenojn.

Sed la unua faro necesa por prezenti bonan kurludon estas la elekto de la toroj de batalo. Ili devas esti kvinjaraj, belaj kaj pezaj, zorge elektitaj en la ganadoj\* el kiuj oni forigas la nebatalemajn torojn. La postulataj ses toroj kostas ĉirkaŭe sep ĝis dek mil frankoj (2,800 — 4,000 Sm.) ne kalkulante la koston de veturado, iafoje tre longa : de Sevilla ĝis Beziereks ekzemple. Post la apartigado\* oni riglas la torojn en specialaj fortegaj lignaj kaĝoj, en kiuj ili ne povas moviĝi, sekve ne povas difekti siajn kornojn donante kornbatojn.

Kiam ili estas alvenintaj sur la plazon\*, oni liberigas ilin en la torejo\* aŭ toreja korto, kie ili ripozas dum ok tagoj ĉirkaŭe, observataj kaj zorgataj de la ganadisto delegita de la ganada posedanto — ĉar fama ganadestro ĉiam konservas por si mem la propran kvaliton de siaj bestoj kaj zorge atentis, ke liaj bovoviroj ne estu uzataj aliloke por la reproduktado. Poste oni denove apartigas la bestojn en la ĉikerojn\*, la matenon mem de la kurludo ; ili restas tie, ne vidante la taglumon, ĝis la momento kiam oni enirigas ilin en la redondelon .

## FORMADO DE LA KVADRELO

Por formi sian kvadrelon, la matadoro aldonas al si unu sobresalienton\*, tri aŭ kvar banderistojn\* — aŭ mantelistojn — kaj du pikadorojn.

La sobresaliento devas apudesti la matadoron, helpi lin dum lia brego\*, kaj precipe dum la lasta suerto\*, sed nur kiam la toro estas malfacile batalebla.

La sobresaliento plenumas la oficon de puntelista\*. Laŭ severa regulo la puntelista havas la rajton tuŝi la toron nur kiam ĝi estas kuŝanta, post la estokado\*.

La banderistoj plenumas la duan suerton. Ili fiksas, laŭ la reguloj, banderilojn\* sur la morelon\* de la toro.

La pikadoroj, kies kruroj estas protektataj de fera kiraso, rajdas malgrasegajn ĉevalojn. Ili estas armitaj de pikego, kiun ili pikas sur la ŝultrojn de la toro, por ĝin haltigi, kiam ĝi kuras al iliaj ĉevaloj. Ili plenumas la unuan suerton.

## LA LIDIO

La ĉefspadisto direktadas la lidion\*. Li zorgas pri la bona fariĝo de la diversaj suertoj.

Sed la Prezidanto de la kurludo ordonas estre kaj juĝas definitive. Li faras signalon por malfermi la torejan pordon, tra kiu la toro eniras en la redondelon ; li ankaŭ per diversaj sonadoj de trumpetoj, ordonas la ŝanĝon de suerto. Li devas esti perfekta aficonanto\*, posedi grandan sciadon pri la toromakio, koni la staton, karakteron aŭ forton de ĉiu batalanta toro por scii ĝis kiu grado: oni devas daŭrigi ĉiun suerton tiamaniere ke, ĉe la lasta suerto, la besto ne estu en malbona stato.

Iafoje povas okazi, ke nur unu sola trafo tro profunda de pikego estas sufiĉa por grave vundi la toron; la prezidanto — vigle atenta — devas tuj ordoni la ŝanĝon de suerto, eĉ se la toro ne suferis la tri piktrafojn postulatajn de la regularo.

La lidio difinita por unu toro dividiĝas en tri partoj tre malsimilaj, nomataj : la unua, suerto de pikegado\*, la dua, suerto de banderado\*, kaj la tria, suerto de estokado\*.

## SUERTO DE PIKEGADO

Kiam toro eniras en la redondelon, ĝi unue estas kvazaŭ blindigita de la vidaĵo, kiun prezentas la areno plena je ĉeestantoj ; sed post momenta hezito, ĝi tuj ekkuregas tra la redondelo kaj sin ĵetas al ĉiu kontraŭstaro, kiun ĝi renkontas.

Tiam oni diras, ke ĝi estas levantada\*. Jen ĝi persekutas toreadoron, kiu saltas en la rondirejon\*, kaj kolere donas kornbatojn al la barilo\*, kiun ĝi difektus, se ĝi ne estus konstruita tiele ke la tabuloj glitas inter fosoj, kaj la toro sukcesas nur elsaltigi tabulojn, nenion rompante, — jen li sin ĵetas al alia staranta mantelista, sed ĉiam ĝi trafas nur pecon da ŝtofo; dum tiu batalema humoro oni ĝin gvidas al pikadoroj.

(La regularo malpermesas al la mantelistoj difekti la krurojn de la toro per multaj mantelpasoj, antaŭ ol konduki al la pikadoroj, sed ofte la majstro salutas la eniron de la besto per kelkaj lertegaj mantelpasoj.)

Bona toro ricevas ĝis ses aŭ sep pikoj : t. e. ke li sin ĵetas tiom da fojoj sur la rajdantojn, sekve ricevas ĉiufoje pikegon sur la morelon aŭ la ŝultrojn kaj baldaŭ sango ŝprucas kaj fluas sufiĉe forte.

Sed tio ne ĉiam efektiviĝas sen akcidento. Ofte la toro sukcesas proksimiĝi al la ĉevalo kaj enpikas siajn kornojn en ĝiajn flankojn. Iafoje, ĉevalo kaj rajdanto estas sublevataj kaj forte ĵetataj sur la sablon.

La tasko de matadoro tiam estas alkuri al kito\*, t. e. altiri al si mem la atenton de la bruto, kaj ĝin malproksimigi de la loko, kie okazis falo. Por fari kiton, la matadoro alpaŝas ĝis antaŭ la nazo de la toro, prezentas sian mantelon, kaj per taŭgaj pasoj forlogas, incitas la bruton, kaj sin amuzas per ĝi, ne kiel kato per muso — ĉar tie ĉi la muso estas la toreadoro kompare kun tiaj fortegaj bestoj kiaj estas la hispanaj toroj, sed kiel sin amuzus muso per kato — kaj ĉiam kunigante zorge la elegantecon kun la bravegeco; fine, per rapida navareso\*, aŭ alia mantelpaso, li haltigas subite la beston antaŭ si, kaj foriras trankvile, prezentante sian dorson al la toro ; aliafoje, li genufleksas antaŭ la besto staranta senmove, kvazaŭ ĝi estus senkonsciigita de tiom da malmatego; eĉ li metas iafoje: dum momento sian monteron\* sur ĝian kapon. Kito bone sukcesinta ĉiam naskas tondradon de aplaŭdoj.

Laŭ la regularo, krom la kvar pikadoroj de la du kvadrelaj, estas kvina pikadoro staranta armita ĉe la ĉevaleja pordo kaj ĉiam preta por eniri en la rondelon kaj anstataŭi falintan pikadoron.

## SUERTO DE BANDERADO

Tuj kiam trumpetoj sonadis ŝanĝon de suerto, la banderistoj de la kvadrela laŭvice batalonta prenas la bastonetojn kaj ilin pikas sur la toron, uzante diversajn manierojn, laŭ sia kapableco kaj laŭ la karaktero de la besto. La plej uzata enmeto estas tiu « al kvarteo\* ».

Ordinare la toro ricevas kvar aŭ kvin ilojn da banderiloj; la prezidanto sonigas ŝanĝon de suerto kaj la matadoro prenas la trastilojn\*.

Kiam la toro malbone batalis dum la ludo de pikegado, kaj ne ricevis almenaŭ tri pikegojn, oni kondamnas ĝin suferi la enmeton de unu aŭ du parojn da fajrbanderiloj\*.

## SUERTO DE ESTOKADO

Tuj post la sonado, la majstro iras, tenante spadon\* kaj muleton\* en la maldekstra mano, por stari antaŭ la Prezidanto, aŭ alia grava persono aŭ grupo ĉeestanta, kaj laŭte elparolas sian bridon\* ; je la fino de sia parolado, li ĵetas sian monteron “, kiun li tenas en la dekstra mano.

Dum silentado de la publiko, la matadoro antaŭeniras sola kontraŭ la toro. Alveninte je regula distanco, li prezentas la muleton kaj faras taŭgajn pasojn — laŭ la karaktero de la toro — kies celo estas meti la beston en regula starado kaj ankaŭ lacigi ĝin tiele ke ĝi mallevos la kapon kiel necese estas.

Precipe dum la ludo de muleto (muletabrego) la matadoro montras sian tutan talenton; ĉiu muletpaso estas taksata, ŝatata aŭ kritikata de la aficonantoj; jen brusta paso\* naskas longan triumfan aplaŭdon, jen serio da pasoj rondformaj\* kaŭzas miregadon kaj laŭdajn vortojn.

Sed fine la toro laciĝas kaj mallevante la kapon, ĝi lasas sian kontraŭulon proksime stari; la matadoro elektas tiun momenton : per lertaj pasoj de la ruĝa ŝtofo, li metas la toron en bona pozicio — rekta staro kaj la antaŭaj piedoj sur sama linio; tiam la matadoro sin armas, tenas la estokilon horizontale je la alto de la brusto, celante la lokon frapotan; subite li iom movas la muleton, antaŭen sin ĵetas kaj internigas la spadon inter la ŝultroj de la besto. Li evitas la kornadon\* prezentante la muleton al la flanko kontraŭa de tiu sur kiu li preterpasas.

Laŭ la maniero kiel la estokilo trafas la toron, oni diras ke estoko estas baja\*, honda\*, kaida\*, ktp. Kelkafoje la toro falas tuj, mortefrapita; sed plejofte, kvankvam morte vundita, ĝi iras, blekante, laŭlonge de la barilo kaj tie kuŝiĝas, tenante alte la kapon ĝis trafo de puntelo; aliafoje la toro longe staradas, preskaŭ senmove, kaj ne falas, kvankam tamen bone trafita; sed en kiu ajn okazo la rezultato dependas pli de hazardo ol de lerteco de la matadoro, spite la kredo de multaj personoj — sufiĉas nur ke la bato de estokilo estu bone kaj regule donita kaj trafu bonan lokon.

Tuj kiam la toro kuŝiĝas (en la dua okazo) ĝi ne plu apartenas al la matadoro : tiam la puntelista alproksimiĝas malantaŭ la besto kaj mortigas ĝin per trafo de puntelo en la cerbeton.

Se, laŭ la tria okazo, la toro longe daŭrigas sian staradon, la matadoro tiam devas ĝin mortigi per deskabelo\*.

Aliafoje estas necese uzi duan aŭ trian estokon; eĉ oni vidis famajn matadorojn doni ĝis kvin aŭ ses estokoj por mortigi la bruton, ĉu pro malbona ŝanco, ĉu pro ĝia maloportuna starado.

Kutime, kiam la matadoro bonege estokis sian toron, li iras laŭronde de la areno salutante la publikon, kaj la aficonantoj, por montri sian kontenton, alĵetas al li kvanton da ĉapeloj, sunombreloj, cigaroj, k. t. p.

Kelkafoje la prezidanto ordonas detranĉi orelon de la mortinta toro kaj ĝin donacas al la majstro : tio estas la plej granda honoro farebla al matadoro.

## **ARASTRO**

Sed dum tiu ĉi triumfo eliras el la ĉevalejo la jungitaro de arastro\*, t. e. tri fortaj kaj belaj ĉevaloj, ornamitaj per rubandoj, bantoj, pendaĵoj, standardetoj, k,t,p. Ili estas jungitaj kaj trenas ŝnuron; ili galopas ĝis la mortinta toro — la ŝnuro estas rapide alligata al ĝiaj kornoj kaj la ĉevaloj, direktataj de tri kondukantoj ekkuras, fortrenante ĝin sur la sablo de la rondelo kaj eniras rapide en la arastrejon\*.

Tion ĉi oni nomas arastro. ....kaj tuj la pikadoroj reiras sur sian lokon en la rondelo, la trumpetoj sonas kaj nova toro eniras en la arenon.

## **PRISKRIBO DE FRANCA KURLUDO**

La franca kurludo tute diferencas de la hispana, ĉar la toroj ne estas difektataj kaj mortigataj. Sekve, la kvadreloj enhavas neniun pikadon nek matadon, sed nur ĉefon de kvadrela akompanata de kvar aŭ kvin aliaj toreadoroj.

Tial ke la toroj estas neniam mortigataj, ili estas prezentataj en ĉiu nova kurludo kaj alkiŝitaj al la ludo. Ili elscias rapide ĉiujn ruzojn uzatajn de la toreadoroj kaj. iĝas pli malfacile bataleblaj kaj pli danĝeraj. Kelkaj el ili, speciale fortaj aŭ ruzaj, akiras grandan famon ; oni konas ilian nomon, kelkafoje en tuta suda Franclando.

Ekzemple « la tajloro » (li ricevis tiun nomon, eble ĉar li ŝiris kelke da pantalonoj de siaj kontraŭuloj) estis tiom timata, ke nur la plej bonaj razedistoj\* kuraĝis alpaŝi al ĝi.

Ofte dum franca kurludo oni prezentas unu el tiuj malfacile bataleblaj toroj portanta sur sia frunto, inter la kornoj, alligitan banton, kiun la toreadoroj penas preni. La plej lerta razedisto sukcesinta eltiri la banton gajnas sumon da cent aŭ eĉ kvin cent frankoj (40-200 Sm.). .

La spertaj toroj tre bone scias distingi la mantelon de la toreadoro kaj sekve ne lasas sin trompi. Tial la francaj toreadoroj malofte uzas la mantelon.

Ilia ludmaniero estas precipe lerta kaj rapidmova. Ili proksimiĝas al la toro per trakurado nomata razedo\*. Tiele ili almetas bantojn sur la kolon, la kapon kaj eĉ la nazon de la besto. Ili pikas ankaŭ banderilojn, sed la fera harpuno estas multe pli malgranda ol tiu de la hispanaj banderiloj ; tiamaniere la pikvundo estas malgrava.

Ili efektivigas la kiebron\* kun granda lerteco kaj bravegeco. Ili senmantele — starante kun la brakoj krucigitaj kaj ofte kun la du piedoj sur sia beredo\* kuŝanta tere — atendas senmove la toron kaj faras la movon necesan nur kiam la toro alvenas en juridicion\*, nur movante unu el siaj piedoj.

Por transsalti la toron la franca toreadoro montriĝas nepre supera. Unuj per helpo de stango, saltas super la toron kuregantane al ili; aliaj saltas sen stango, eĉ farante renversiĝantan salton, aŭ kun piedoj kunligitaj per naztuko.

Tiuj kurludoj longe interesis niajn sudajn francajn popolojn, sed nun estas necesaj la hispanaj kurludoj kun sia tuta graveco, sia lukso kaj siaj emocioj.

## LANDESA (1) KURLUDO

En la franca kurludo nomata landesa, la kapo de la toro estas alligita al longa ŝnuro tenata de speciala metiisto, kiu tiamaniere gvidas la iradon de loro; la landesaj torĉadoroj praktikas nur la kiebrojn kaj la saltadon. Tamen malfeliĉaj akcidentoj okazas sufiĉe ofte.

(1) *El la nomo de la franca departemento « Les Landes ».*

## PROVENCA (1) FERADO

La provenca ferado estas iafoje montrata en prezento. En la areno, malgrandaj provencaj bovinoj estas persekutataj de kavaliro armita per longa stango finiĝanta per fera tridento. La rajdanto kun granda lerteco frapas la bestojn poste, en la supraĵon de la femuro, ĉe la naskiĝo de la vosto kaj ofte sukcesas ĵeti ilin teren.

Tiamaniere la gardistoj de la grandaj brutaroj en la insulo Kamargo (2) renversas la junajn torojn por ilin marki, per brulanta fero ; tion oni nomas ferado.

(1) *Provenco : Provence. Provinco de suda Franclando.*

(2) *Kamargo : Camargue. Insulo ĉe la enfluo de la rivero Rhone en la Mezamaro.*

## 2 - TORA KURLUDO

*Laŭ la verko : Voyage en Espagne (Vojaĝo en Hispanujo) de la franca aŭtoro Théophile Gautier*

Ĉie oni diris kaj rediris, ke la ŝato al la toraj kurludoj pereas en Hispanlando, kaj ke la civilizacio baldaŭ ilin malaperigos.

Se la civilizacio tion efektivigos, ĝi malbone faros, ĉar tora kurludo estas unu el la plej belaj prezentadoj, kiujn la homoj povas imagi; sed tiu tago ankoraŭ ne alvenis, kaj sentemaj verkistoj, kiuj certigas la malon, nur devas stari, iun lundon inter la kvara kaj la kvina horo, ĉe la pordo de *Alcala* (Madrid) por konvinkiĝi, ke la supre dirita ŝato al tiu ĉi kruelega amuzo ne estas baldaŭ malaperonta.

Lundo, *dia de Toros*, (tago por toroj) estas festa tago ; neniuj laboras, la tuta urbo bruas ; tiuj kiuj jam ne prenis sian bileton, grandpaŝe marŝas al la *Calle de Caretas*, kie staras la luejo, esperante trovi neluitan lokon, ĉar, laŭ bona aranĝo, tiu grandega amfiteatro estas tute numere ordigita po unu sidloko por ĉiu persono.

La *Calle de Alcala*, kiu estas la strato kien alfluas la popolamaso de la aliaj stratoj, estas plena de piedirantoj, kavaliroj kaj veturiloj ; pro tiu soleno eliras el siaj polvaj restejoj la plej strangaj kaj la plej neordinaraj « calesines » kaj veturiloj; ankaŭ sin montras la jungitaroj la plej fantaziaj kaj la mulinoj la plej fenomenaj.

La *calesine* similas la *corricoli* de Napolo : grandaj radoj ruĝaj, kesto sen risortoj, ornamita per pli-malpli alegoriaj pentraĵoj, subŝtofitita per damasko aŭ seriko kun *rokoko* kiu faras la plej amuzan impreson.

La kondukanto sidiĝas sur la flanktimonon ; de tie li povas pli oportune alparoli kaj bastonfrapi sian mulinon, kaj plie, tiel lasas sian propran lokon por klientoj.

La mulino estas beligita per tiom da rubandoj, plumegoj, tufoj, bantoj kaj sonoriletoj kiom estas eble pendigi da ili ĉe jungilaro de ia ajn kvarpieda besto.

Unu *calesine* entenas ordinaro *manola*'n kaj ŝian amikinson, kun ŝia *manolo*, ne parolante pri aro da *muchachos* (knabetoj) alkroĉiĝintaj ĉe la posta parto.

Ĉio rapidiras kiel vento en turniĝado de krioj kaj de polvo

Estas ankaŭ kaleŝoj kun kvar aŭ kvin mulinoj, al. kiuj similas nur tiuj, kiujn oni vidas sur la pentraĵoj de *Van der Meulen* montrantaj la almitojn kaj ĉasojn de *Louis XIV*.

Oni vidas ankaŭ kamparanojn rajdantajn ĉevale aŭ azene, ĉu sole, ĉu kun iliaj edzinoj, ne kalkulante kaleŝojn de riĉuloj, kaj amason da honestaj urbanoj kiuj rapide alpaŝas.

La *plaza* de toroj staras maldekstre ekster la pordo d'*Alcala* ; ĉar ĉiuj antaŭluis sian bileton la eniro efektiviĝas sen malordo. Ĉiu grimpas al sia loko kaj sidiĝas laŭ sia numero.

En la areno; staras laŭronde kaj ĉe malgranda spaco de l'interna muro, ligna barilo alta je ses futoj, sangruĝe pentrita, kaj havanta ĉe ambaŭ flankoj (ĉe du futoj super tero) randaĵon, sur kiun la ĉuloj kaj la toreadoroj apogas piedon por transsalti la barilon, kiam ili estas tro rapide persekutataj de la toro. La internon de tiu ĉi barilo — redondela flanko — oni nomas *las tablas*.

Ĝi havas kvar pordojn, kiuj utilas por la servo de la plektitaj franĝoj kaj silkaj rubandoj, kaj entute rodondelo. eniro de la toroj, eliro de la mortintaj ĉevaloj, k.t.p.

Post tiu barilo estas muro iom pli alte staranta. Ili ambaŭ formas koridoron (rondirejo) kie restas la laciĝintaj toreadoroj, la *rezerva pikadoro* — kiu ĉiam tie staras armita kaj preta por eniri en la redondelon se okaze alia pikadoro estas vundita aŭ senarmigita — la *cachetero* (puntelisto) kaj kelkaj aficonantoj, kiuj per. Klopodado sukcesas, malgraŭ la regularo, alrampi en tiun feliĉigan rondirejon, kies enirado estas tiel ŝatata en Hispanujo kiel enirado ĉe la *Opera kuliso* en Parizo.

Ĉar la toro incitegita ofte transsaltas la unuan barilon la muro estas preskaŭ neatingebla pro sia alteco. Tamen oni vidis torojn de *muchas piernas* (kun lertaj kruroj) kiel oni diras teknike, kiuj supersaltis tiun ĉi muron, kiel tion certigas gravuraĵo de la *Tauromaquia de Goya*, la fama aŭtoro de *Kapricoj*, figuraĵo kiu montras la morton de l'*Alcado* de Torrezon, malfeliĉe trapikita de unu el tiuj saltemaj toroj.

Post la muro komenciĝas la ŝtupoj difinitaj por la ĉeestantoj. Tiuj kiuj estas apud la ŝnuroj estas nomataj *barrera* ; tiuj kiuj estas en la mezo : *tendido*; pli supre la tabloncillos kontraŭ la *gradas cubiertas*.

Tiuj gradoj, kiuj memorigas tiujn de la romaj amfiteatroj, estas el dubeblua granito kaj havas nur la ĉielon kiel tegmenton. Poste estas kovritaj sidlokoj, la *gradas cubiertas* kaj supre la loĝioj nomitaj *palcos*.

La areno entenas ĉirkaŭe dek-du mil rigardantojn, kiuj sidas ĉiuj komforte kaj vidas perfekte, kio estas necesega por tiu prezentado. Tiuj kiuj ne povas trovi lokojn de *sombra* (ĉe ombro) preferas kuirigi vivaj ĉe la suno sur la gradaro ol preterlasi kurludon.

Kiam mi elpaŝis el la interna koridoro por iri al mia loko, mi sentis kvazaŭ kapturnigan blindiĝon. Ŝutegado da lumo eniĝis en la tutan arenon, ĉar la suno estas rimarkinda lustro. Grandega bruado tormis kvazaŭ brua nebulo sur la placo. Ĉe la suna flanko svingiĝis kaj briletis miloj da ventumiloj kaj malgrandaj rondaj sunombreloj ; tio ŝajnis flugado de birdoj kun aliiĝantaj koloroj. Estis neniu neokupata loko. Mi certigas, ke tio jam estas mirinda spektaklo, kiam oni vidas dek-du mil ĉeestantojn en teatro tiel vasta, ke nur Dio povas pentri la plafonon per la belega bluo, kiun li ĉerpas el la urno de la eterneco.

La nacia rajdanta gvardio ĉirkaŭiris en la redondelo ; antaŭ ĝi rajdis du algvaziloj\* en sia speciala vesto — plumego kaj ĉapelo laŭ Henri IV, ĝustveŝto kaj mantelo nigraj, botoj de rajdanto — kiuj forpelis el la redondelo kelkajn obstinajn aficonantojn kaj kelkajn malfruiĝintajn hundojn.

Malpleniginte la redondelon, la du algvaziloj iris preni la toreadorojn, t. e. la pikadorojn, banderistojn, mantelistojn, kaj la matadoron, ĉefan aktoron en la dramo — kiuj ĉiuj eniris dum sonado de muziko.

La pikadoroj rajdas ĉevalojn kies okuloj estis vinditaj, ĉar, vidante la torojn, ili povus fari danĝerajn flanksaltojn. Ilia vesto estas pentrinda. Ĝi konsistas el mallonga nebutonumita jako el veluro oranĝkolora, karnkolora, verda aŭ blua, kovrita per oraj aŭ arĝentaj brodaĵoj, per brilajetoj, pasamentoj, franĝoj, filigranaj butonoj, kaj ĉiuspecaj ornamoj, precipe sur la ŝultroj, kie la ŝtofo tute malaperas sub kunplektita amaso da lumigaj arabeskoj; el veŝto samstila, el ĉemizo kun ĵaboto; el diverskolora kravato senzorge ligita ; el silka zono kaj el pantalonoj faritaj



per brunruĝa bubala ledo, remburitaj kaj interne rigidigitaj per lado por ŝirmi la krurojn kontraŭ kornadoj. Griza ĉapelo malaltforma kun grandaj randoj plibeligita per tufego da bantoj, dika reto kun nigraj rubandoj nomata, mi kredas, mono kunigas la harojn malantaŭ la kapo kaj tutigas la vestaron.

La pikadoro havas kiel armilon stangon kun fera pinto longa je unu aŭ du koloroj ; tiu feraĵo ne povas grave vundi la toron sed sufiĉas por ĝin inciti kaj ĝin haltigi. Leda ingo je la dikfingro de la pikadoro malhelpas la glitadon de la stango en la mano ; la selo estas tre alta antaŭe kaj malantaŭe kaj similas al la jungoj tegitaj de ŝtalo sur kiuj rajdis, por la turniroj, la kavaliroj mezepokaj ; la piedingoj estas el ligno kaj formas lignajn ŝuojn kiel turkaj piedingoj. Longa fera sprono, akra kiel ponardo, armas la kalkanojn de la rajdisto; por direkti ĉevalojn ofte duone malvivajn, ordinara sprono estus nesufiĉa.

La mantelistoj havas eksterajn lertan kaj viglan kun siaj atlasaj mallongaj pantalonoj verdaj, bluaj aŭ rozkoloraj, arĝentbroditaj sur ĉiuj kunkudroj, siaj silkaj ŝtrumpoj karnkoloraj, sia jako ornamita per floraj desegnaĵoj, sia zonumo streĉita kaj sia monero. Ili tenas sur la brako ŝtofan mantelon (*capa*) kiun ili malvolvas kaj flirtigas kvazaŭ papiliono antaŭ la toro pov ĝin inciti, blindigi kaj trompi.

Ili estas junuloj belformaj, maldikaj kaj graciaj, kontraŭe de la pikadoroj, kiuj estas ordinare rimarkindaj pro sia alta kresko kaj atletaj formoj. Unuj bezonas forton, aliaj lertecon.

La banderistoj estas same vestitaj kaj havas specialecon : piki sur la ŝultrojn de la toro sagojn havantajn harpunon kaj beligitajn per ĉirkaŭtranĉita papero diverskolora. Tiujn ĉi sagojn oni nomas banderiloj, kaj ili estas difinitaj por eksciti la koleregon de la toro kaj doni al ĝi la gradon de furiozeco necesan por prezentigi ĝin en bonaj kondiĉoj antaŭ la spado de la matadoro.

Oni devas enpiki du banderilojn samtempe, tial estas necese pasigi la du brakojn inter la kornoj de la toro, ago delikata dum kiu ia malatento estus danĝera.

La matadoro (aŭ spadisto) diferencas de la banderistoj nur per pli riĉaj ornamaĵoj sur sia vesto, iafoje el purpura silko, koloro tre malagrabla por la toro. Liaj armiloj estas : longa spado kun kruca tenilo, kaj peco da ŝtofo skarлата streĉita laŭlarĝe per bastomo ; la teknika nomo de tiu flirtanta ŝildo estas muleto.

Vi jam konas la teatron kaj la aktorojn, ni tuj vidigos ilin laborantaj. La pikadoroj kaj ĉuloj (*1*) iras saluti la loĝion de la *afuntamiento*, de kie oni ĵetas al ili la ŝlosilon de la torejo ; la ŝlosilo estas prenata de la algvazilo, kiu ĝin alportas al gardisto, kaj post la saluto galopege forkuras forpelita de krioj kaj insultoj de la popolamaso, ĉar en Hispanujo la algvaziloj kaj ĉiuj reprezentantoj de la leĝo ne estas amataj de la popolo.

*(1) La aŭtoro ofte uzas la vorton ĉulo, kiun oni antaŭe donis al la mantelistoj.*

Dume la du pikadoroj iras stari maldekstre de la pordo de la torejo, ili sin metas ĉe malgranda interspaco unu de la alia, la dorso apud la barilo, bone firmigitaj sur siaj seloj, la lanco ĉe la pugno kaj pretaj por ricevi brave la sovaĝan beston; la mantelistoj kaj banderistoj sin metas je ia distanco aŭ disiras en la rondelo.

Tiuj ĉi preparadoj, kiuj ŝajnas pli longaj laŭ la priskribo ol ili estas reale, ekscitas la vidvolemon ĝis plej alta grado.

Ĉiuj okuloj sin turnas maltrankvile al la fatala pordo, kaj el tiuj dekdu mil rigardoj eĉ unu sola ne sin direktus al alia flanko. La plej bela virino de la tero ne ricevus almozon de rigardo en tiu momento.

Mi konfesas ke, miaflanke, mia koro estis premata kvazaŭ de nevidebla mano ; miaj tempioj siblis kaj ŝvito varma kaj malvarma pasis sur mia dorso.

Estas unu el la plej fortaj emocioj, kiujn mi jam sentis.

Akra fanfaro sonis, la du partoj de la pordo malfermiĝis bruege kaj la toro sin ĵetis en la arenon meze de grandega hurao.

Ĝi estis belega besto, preskaŭ nigra, brila, kun dikega fanono (subgorĝo), kvadrata muflo, kornoj kvaronlunaj, akraj kaj poluritaj, kruroj nervaj, vosto ĉiam moviĝanta, kaj havis inter siaj ŝultroj tufeton da rubandoj je la koloroj de sia ganado\*.

Ĝi haltis unu sekundon, enflaris aeron du aŭ tri fojojn, blindigita de la granda lumo, mirigita

de la bruego ; poste, ekvidinte la unuan pikadoron, ĝi furioze sin ĵetis al li.

La pikadoro tiel atakita estis Sevilla. Mi ne povas kontraŭbatali la plezuron priskribi tiun faman Sevilla, kiu estas efektive la idealo de la speco.

Imagu viron ĉirkaŭe tridekjaran, kun nobela mieno, kaj majesta sintenado, fortika kiel Herkuleso, la haŭto bruna kiel mulatro, okuloj belegaj kaj fizionomio kiel unu el la Cesaroj de Titien ; la esprimo de gaja kaj malŝatema kvieteco kiu vidiĝas sur liaj trajtoj kaj lia tuta eksteraĵo vere havas ion heroan.

Tiun tagon, li havis jakon oranĝkoloran, broditan kaj galonitan per arĝento, kiu restas neforigeble desegnita en mia memoro : li mallevis la pinton de sia lanco, celis, kaj kontraŭbatalis la baton de la toro tiel bone, ke la sovaĝa besto ŝanceliĝis kaj preterpasis ricevinte vundon, kiu tuj striis lian nigran haŭton ruĝe; ĝi haltis kun necerteco dum momento, poste tuj sin ĵetis kun duobla furiozeco al la dua pikadoro staranta ĉe ia distanco.

Antonio Rodriguez donis bonan pikegon, kiu malfermis duan vundon proksime de la unua, ĉar oni devas pikegi nur sur ŝultron ; sed la toro returniĝis al li kun mallevita kapo kaj enigis sian tutan kornon en la ventron de la ĉevalo.

La mantelistoj alkuris, skuante siajn mantelojn kaj la malspritega bruto, allogita kaj distrita de tiu nova logilo, tuj persekutis ilin rapidege ; sed la ĉuloj transsaltis la barilon, lasante la bruton tre mirigita, ĉar ĝi vidas nenion plu.

La kornabato estis fendinta la ventron de la ĉevalo, tiamaniere ke la intestoj eliĝis kaj fluis preskaŭ teren ; mi kredis ke la pikadoro forirus por rajdi alian : absolute ne; li tuŝis al ĝi la oreton por certigi sin, ĉu ĝi estas morte frapita. La ĉevalo estis nur fendita (malkudrita) kaj tia vundo, kvankam je malbelega vido, povas resaniĝi ; oni remetas la intestojn en la ventron, oni faras malgrandan kudron kaj la malfeliĉa besto estas ankoraŭ uzebla.

La pikadoro donis al ĝi spronbaton kaj iris, galope, stari sur alian lokon.

La toro ekkomprenis, ke nur pikegadojn li gajnas flanke de la pikadoroj, kaj preferis reiri al la paŝejo. Anstataŭ sin ekĵeti sen ŝanceliĝo, post kelke da paŝoj, ĝi reiradis ĉe sian *querencia* (kerenco“) kun granda obstineco.

Multaj ĉuloj venis svingi siajn brilkolorajn mantelojn antaŭ ĝiaj okuloj; unu el ili vestis ĝian kapon per sia mantelo.

La toro, furioza, sin liberigis klopode de tiu malagrabra ornamaĵo, flugigis aeren la senkulpan ŝtofon kaj trabatis per la piedegoj tiun ĉi mantelon, kiam ĝi refalis teren.

Profitante tiun pligraviĝon de kolero, unu ĉulo\* citis\* ĝin altirante ĝin al la pikadoroj, kaj kiam ĝi estis staranta ĝuste antaŭ siaj kontraŭuloj, la toro ŝamcelskias poste, decidinte sin, tuj sin alĵetis sur Sevilla kun tiom da forto, ke la ĉevalo ruliĝis kun la kvar piedoj aeren, ĉar la brako de Sevilla estas tiel fortika, ke nenio ajn fleksigas ĝin Sevilla falis sub sia ĉevalo, kio estas la plej bona falmaniero, ĉar tiel la homo estas ŝirmita kontraŭ la kornbatoj per la korpo de sia ĉevalo. La ĉuloj sin intermetis, la ĉevalo estis nur ricevinta tranĉegon ĉe la femuro. Oni relevis Sevilla, kiu tuj rerajdis kun perfekta trankvileco.

La ĉevalo de Antonio Rodriguez, la alia pikadoro, estis pli malfeliĉa : ĝi ricevis, sur la bruston, baton tiel fortegan, ke la korno tute eniĝis kaj malaperis en la vundon, Dum la toro penis liberigi sian kapon embarasatan en la korpo de la ĉevalo, Antonio alkroĉiĝis per siaj manoj al la barila rando kaj transpasis en la rondirejon per helpo de ĉuloj, ĉar la falintaj pikadoroj plipezigitaj de siaj botoj povas sin movi ne pli ol la antikvaj kavaliroj enskatoligitaj, tegitaj en siaj feraj armvestoj.

La malfeliĉa ĉevalo, sola ekstrairis la redondelon ŝanceliĝante kvazaŭ ĝi estus ebria ; sango forte ŝprucadis el la vundo kaj striis la sablon per zigzagoj, kiuj montris la malrektecon de ĝia marŝado, fine ĝi falis apud barilo. Ĝi relevis du aŭ tri fojojn sian kapon, rulante bluan okulon jam malbrilan, altirante malantaŭen siajn lipojn blankigitajn de ŝaŭmo, kiuj vidigis ĝiajn senkarnigitajn dentojn, ĝia vosto malforte batis teren ; ĝiaj postaj piedoj moviĝis konvulsie, streĉiĝis kaj lastfoje frapis, kvazaŭ ĝi volus per sia malmola hufo disrompi la maldelikatan kranio de la morto.

Ĝia agonio apenaŭ finiĝis, kiam la deĵoraj ĉuloj — vidante la toron okupatan ĉe alia loko — alkuris por forpreni la selon kaj la bridon.

La ĉevalo restis senveste, kuŝanta flanke, kaj ĝia bruna profilo desegniĝis sur la sablo. Ĝi estis tiel maldika, tiel platigita, ke ĝi ŝajnis detranĉaĵo de nigra papero. Mi jam estis rimarkinta kiajn formojn strange fantomajn la morto donas al la ĉevaloj : ĝi estas certe la besto, kies kadavro estas plej malĝoje vidata.

Ĝia kapo tiel noble kaj pure formita, skulptita per la terura fingro de la malesto, ŝajnas esti enhavinta homan penson ; la kolharoj disigitaj, la vosto etendita havas ion pentrindan kaj poezian. Mortinta ĉevalo estas mortinta korpo, iu alia besto el kiu la vivo forflugis estas nur mortintaĉo.

Mi insistas pri la morto de tiu ĉevalo ĉar tio estas la plej malgaja sensacio, kiun mi sentis dum tora kurludo. Cetere, ĝi ne estis la sola viktimo : tiun tagon dekkvar ĉevaloj kuŝis sur la rondelo — unu toro mortigis kvin el ili.

La pikadoro revenis kun bonstata ĉevalo kaj oni faris ankoraŭ kelkajn atakojn pli-malpli prosperajn. Sed la toro iom eklaciĝis kaj ĝia furiozeco malgrandiĝis ; la banderilistoj alvenis kun siaj sagoj ornamitaj per papero kaj baldaŭ la kolo de la toro ornamiĝis per ĉirkaŭkolo el paperrubandoj, kiujn fiksis pli fortike la klopodoj de la besto por sin liberigi de ili.

Malgranda banderisto nomata Majaron enpikis la banderilojn kun granda sukceso kaj multmego, eĉ unufoje li faris lertan krurbaton antaŭ ol foriri kaj tiel naskis grandan aplaudon.

Kiam la toro estis ricevinta sep aŭ ok banderilojn, kies fera pinto ŝiris al ĝi la haŭton kaj kies papero bruetis al ĝiaj oreloj, ĝi trakuris la rondelon, blekante terure. Ŝaŭmo blankigis ĝian nigran muflon kaj, ebria pro furiozeco, ĝi donis tiel fortajn kornbatojn al unu el la pordoj ke tiu ĉi saltis ekster siaj hokoj. La ĉarpentistoj tuj penis remeti la pordon ; dume ĉulo altiris la toron al alia flanko kaj estis persekutata tiel rapide ke li apenaŭ havis tempon por transsalti la barilon. La toro incitegita faris miregindan potencan ekpenon kaj ankaŭ transsaltis *las tablas*.

Ĉiuj kiuj estis en la rondirejo saltis kun admirinda rapideco en la rondelon, kaj la toro reeniris en la rondelon tra speciala pordo forkondukita per batoj de bastonoj, ombreloj kaj ĉapeloj de la unuavicaj ĉeestantoj.

La pikadoroj foriris liberigante la rondelon por la spadisto Juan Pastor, kiu unue iris saluti la loĝion de l'ajuntamiento kaj peti permeson mortigi la toron ; ricevinte la permeson, li ĵetis aeren sian monteron, kvazaŭ li volus montri, ke li sin dediĉas al la venko aŭ al la morto, kaj alpaŝis al la toro per paŝo decidema, kaŝante sian spadon en la ruĝaj faldoj de sia muleto.

La matadoro flirtigis kelkajn fojojn la skarlatan ŝtofon al kiu la toro sin ĵetis blinde ; nur simpla korpomovo sufiĉis al li por eviti la kornbaton de la bruto, kiu tuj refaris novan penadon, furioze kapbatante la malpezan ŝtofon, kiun ĝi ne povis trapiki. :

La favora momento alveninte, la spadisto staris ĝuste antaŭ la toro, movante la muleton per sia maldekstra mano kaj tenante sian spadon horizontale, la pinto same alta kiel la kornoj de la toro ; estas malfacile dilini per vortoj la maltrankvilan vidvolemon, la frenezeman atenton kiujn naskas tiu situacio valoranta ĉiujn dramojn de Shakespeare; post kelkaj sekundoj unu el la du aktoroj estos mortigita. Ĉu estos la homo aŭ la toro ? Ili ambaŭ estas starantaj unu kontraŭ la alia, solaj ; la homo ne havas defendan armilon, li estas vestita kvazaŭ por balo : pantofletoj kaj silkaj ŝtrumpoj ; pinglo de virino traborus lian atlasan jakon; peco da ŝtofo, malfortika spado, jen estas la tuto.

En tiu ĉi duelo la toro havas ĉiujn materiajn superojn : ĝi havas du terurajn kornojn akrajn kiel ponardoj, grandegan forton, koleron de bruto ne konscianta la danĝeron ; sed la homo havas sian spadon kaj sian koron, dekdu mil rigardojn direktatajn al li ; belaj junaj virinoj tuj aplaudos lin per siaj blankaj manoj !

La muleto moviĝis flanken, lasante malkovrita la bruston de la matadoro ; la kornoj estis nur je unu colo de lia brusto ; mi kredis lin tuj pereonta. Arĝenta fulmo trapasis kun rapideco de penso inter la du kornoj ; la toro falis sur la genuoj kaj blekis dolore havante la spadan tenilon inter la du ŝultroj, same kiel tiu cervo de Sankta Hubert kiu portis krucifikson inter la branĉaĵo sur sia kapo, kiel estas montrite sur la mirinda gravuraĵo de Albert Dürer.

Tondro de aplaŭdoj tuj bruegis en la tuta amfiteatro : la *palcos* de la nobelaro, la *gradas cubiertas* de la burĝaro, la *tendido de la manolos* kriegis kun la tuta fervoro kaj la viveco de la Suduloj : *Bueno! Bueno ! Viva el Barbiro! Viva!!!* (Juan Pastor oni alnomis *el Barbiro*.)

La ago kiun ĵus faris la spadisto estas efektive tre estimata, oni ĝin nomas *estocada a vuela pies*; la toro mortas dum elfluas neniu guto da sango, kio estas supera eleganteco, kaj falinte surgenue ĝi ŝajnas konfesi la superecon de sia kontraŭulo.

La aficonantoj opinias ke la elpensinto de tiu frapmaniero estas Joaquim Rodriguez — fama toreadoro de la pasinta jarcento.

Kiam la toro ne ricevas tujan morton oni vidas transsalti super la barilo misteran viron, nigre vestitan, kiu ne partoprenis al la kurludo : li estas la *cachetero*. Li alpaŝas malantaŭ la toro kaj vidinte ĉu ĝi estas kapabla stariĝi, li trapuŝas perfide ponardon, kiu tranĉas la spinan cerebron kaj senvivigas la beston kun fulma rapideco. La bona loko estas malantaŭ la kapo ĉe kelkaj koloroj de la linio de la kornoj.

La militista muziko sonis ; unu el la pordoj malfermiĝis kaj kvar mulinoj belege jungitaj kaj ornamitaj per plumetoj, tintiletoj, lanaj penikoj kaj standardetoj flavaj kaj ruĝaj — hispanaj koloroj — eniris galope en la arenon.

Tiu ĉi jungitaro estas difinita por elŝovi la mortintajn bestojn, kiujn oni alligas al la ekstremaĵo de ŝnuro finiĝanta per krampo. Oni forŝovis unue la ĉevalojn, poste la toron.

Tiuj ĉi kvar mulinoj brilornamitaj kaj sonorantaj, kiuj trenis sur la sablo, kun furioza rapideco ĉiujn ĉi korpojn kiuj ĵus kuris tiel bone, havis vidiĝon strangan kaj sovaĝan, kiu kaŝis iom la funebrecon de ilia ofico; deĵora servisto trairis kun korbo plena de sablo kaj ĝin disĵetis sur sangajn marĉetojn, sur kiuj eble glitus la piedoj de la toreadoroj.

La pikadoroj reiris al sia loko apud la pordo, la muziko sonis fanfaron kaj alia toro eniris en la arenon, ĉar tiu ĉi prezentado ne havas interakton; nenio, eĉ morto de toreadoro ĝin malhelpas aŭ haltigas; kiel mi diris, subaktoj tie staras tute vestitaj kaj armitaj okaze de eblaj akcidentoj.

Mi ne intencas rakonti laŭorde la morton de la ok toroj mortigitaj en tiu tago ; mi nur parolos pri kelkaj diversaĵoj aŭ okazaĵoj rimarkindaj.

La toroj ne estas ĉiam tre furiozaj ; eĉ kelkaj estas tre pacemaj kaj dezirus nur kuŝiĝi ĉe ombro. Oni vidas, laŭ ilia mieno honesta kaj trankvila, ke ili pli ŝatus paŝtejon ol arenon.

Ili prezentas sian postaĵon al la pikadoroj kaj lasas pacience la mantelistojn skui ĉiakolorajn mantelojn antaŭ sia nazo ; eĉ la banderiloj ne sufiĉas por inciti ilin ; tial estas necese uzi la perfortajn rimedojn : la fajrbanderilojn. Tio estas kvazaŭ vergoj pulve flamiĝeblaj, kiuj ekbrulas kelke da minutoj post la enpiko en la ŝultrojn de la toro *cobarde* (malkuraĝa) kaj eksplodas kun fajrerado kaj granda bruoj.

Per tiu ĉi sagaca eltrovo, la toro estas samtempe pikata, brulata, kaj surdigata ; eĉ se ĝi estas la plej aplomada el la toroj ĝi devige sin decidis fariĝi furioza. Ĝi faras multajn strangajn saltojn, ĝi blekegas, ŝaŭmas kaj konvulsias por liberigi sin de tiu netaŭga artfajraĵo, kiu rostas al ĝi la orelojn kaj ekbrulas la ledon.

Cetere la fajrbanderiloj estas la lasta rimedo uzata. Ilin uzi estas io kvazaŭ malhonora por la kurludo ; sed, en tia okazo, se la alkado tro prokrastas fari signalon svingante sian naztukon, oni faras tian bruegon, ke li estas ja devigata konsenti. Aŭdiĝas krioj, kriegoj, blekoj, piedfrapadoj neimageblaj. Unuj krias : *Banderillas de fuego (1)!* aliaj: *Perros! perros (2)!*

(1) *Fajrbanderiloj.* (2) *Hundoj ! (La hundoj jam de longe ne estas plu uzataj en la kurludoj.)*

Oni insultas la toron, oni nomas ĝin rabisto, mortiginto, ŝtelisto, oni proponas al ĝi lokon ĉe ombro, oni diras al ĝi mil ŝercojn ofte tre spiritajn. Baldaŭ ĥoro per bastonoj aldoniĝas al la kriegoj jam fariĝintaj nesufiĉaj. La plankoj de la *palcos* krakas kaj fendiĝas.

La incitegeco estas ĉe sia plej alta grado : *Fuego al alcade! perros al alcade !* blekegas la popolamaso, minacante per la pugno la loĝion de l'ajuntamiento. Fine la postulita permeso estas donita kaj kvieto revenas, Dum tiaspecaj kriegoj oni aŭdas kelkafoje vortojn tre ŝercemajn. Mi tuj raportos al vi unu tre mallongan kaj tre lertan : pikadoro belege vestita per tute nova vesto promenis sur sia ĉevalo ne laborante, kaj en loko de la redondelo kie ne estis danĝero. *Pintura!*

*pintura!* Ekkriis la popola amaso ekvidante lian agadon.

Iafoje la toro estas tiel malkolerema ke la fajrbanderiloj ne sufiĉas. Ĝi reiras en sian kerendon kaj ne volas eniri (1). Tuj rekomenciĝas la krioj : *Perros! Perros!* Tiam laŭ signalo de la alkado la hundoj eniras.

(1) *Eniri en suerton ; eniri en juridicion.*

Ili estas admirindaj bestoj havantaj purecon de raso kaj belecon eksterordinarajn; ili iras rekte al la toro, kiu sukcesas ĵeti aeren duonan dekduon da ili, sed tamen ne povas eviti, ke unu aŭ du el la plej fortaj kaj la plej kuraĝaj ekkaptu ĝian orelon. Tiam tiuj ĉi hundoj estas kiel hirudoj kaj ili neniam ellasas. La toro skuas la kapon, alfrapas ilin al la bariloj : nenio sukcesas. Kiam tio estas daŭrinta dum iom da tempo la puntelisto enigis spadon en la flankon de la suferanto, kiu ŝanceliĝas, fleksas la genuojn kaj falas teren, kie oni ĝin fine mortigas.

Iafoje okazas ke la matadoro ne sukcesas sian faron : la spado renkontas oston kaj resaltas, aŭ eniĝas en la gorĝon kaj igas la toron vomegi sangon, kio estas grava kulpo laŭ la toromakiaj reguloj.

Se per la dua estoko la besto ne estas tute mortigita, la spadisto tuj ricevas fajfadon, kriojn, insultojn, ĉar la hispana publiko estas senpartia; ĝi aplaŭdas toron kaj homon laŭ ilia merito mem. Se la toro deĵetas homon aŭ ĉevalon : Bravo toro! se la homo sukcesas kontraŭ la toro : Bravo torero! Sed ĝi toleras malkuraĝon nek por homo, nek por besto.

Pri tio mi tuj rakontos al vi fakton, kiu okazis en la arenoj de Malaga kaj kiu bone pruvos tiun netolerecon.

— Dum du tagoj la fama matadoro Montes (jaro 1840) ricevis la plej grandajn honorojn pro sia kapableco kaj sia lerteco en la du unuaj kurludoj. Sed la trian tagon la lasta kurludo okazis kaj Montes, ve! ne sukcesis.

Montes estas riĉa sed li ankoraŭ iras sur la arenon pro sia amo al la tora kurludo.

Montes ne kontentiĝas, kiel la aliaj spadistoj, mortigi toron, kiam estas farita la signalo. Li observas la kurludon, gvidas la batalon, savas pikadorojn aŭ ĉulojn en danĝero. Kelkaj toreadoroj al li ŝuldas sian vivon pro lia intermetiĝo.

Toro ne volis turni sian atenton al la manteloj, kiujn oni svingis antaŭ li, ĝi fosis la ventron de renversita ĉevalo kaj penis atingi la pikadon kiu ŝirmis sin sub la korpo de sia besto. Montes prenis la sovaĝan beston ĉe la vosto kaj farigis al ĝi du aŭ tri rondojn valse, kio naskis frenezajn aplaŭdojn de la tuta popolo ; tio ebligis relevi la pikadon.

Iafoje li staras antaŭ la toro, kun la brakoj krucigitaj, fiksjaj okuloj, kaj la monstro haltas subite, submetita de tiu hela rigardo, akra kaj malvarma kiel spada ŝtalplato. Tiam estas krioj, blekoj, tumulta bruego de aplaŭdoj, piedfrapadoj, pri kiuj oni ne povas havi ideon ne aŭdinte ilin; la deliro kaptas ĉiujn kapojn, ĝenerala kapturigo agitas sur la benkoj la dekkvin mil ĉeestantojn, ebriigitajn de suno kaj de sango; la naztukoj svingiĝas, la ĉapeloj saltas aeren, kaj, sola, Montes kvietas en tiu amaso ĝuas silente, pro sia ĝojo treega sed kaŝata, kaj salutas iom kiel viro kapabla fari multajn aliajn lertaĵojn.

Por ricevi tiajn aplaŭdojn, mi komprenas ke oni riskas sian vivon ĉiuminute ; ili ne estas tro pagataj.

Ho! kantistoj: kun ora voĉo, dancistinoj kun feinaj piedoj, komediistoj ĉiuspecaj, imperiestroj kaj poetoj, kiuj imagas ke vi estas naskintaj entuziasmon : vi ne aŭdis la aplaŭdojn por Montes !

Iafoje la ĉeestantoj mem petegas, ke li konsentu fari unu el tiuj lertaĵoj, por kiuj li ĉiam sukcesas. Beleta junulino krias al li : « Iru señor Montes, iru Paquino (tio estas lia baptonomo), vi kiu estas tiel ĝentila, faru ion — *una cosita* — por sinjorino. » Kaj Montes transsaltas la toron, apogante piedon sur ĝia kapo, aŭ li skuas sian mantelon antaŭ ĝia mullo kaj per rapida movo envolvas ĝin sur sin, tiamaniere ke ĝi formas elegantajn faldojn; poste li tuj faras flankmovon kaj preterpasigas flanken la beston kiu kuras tro rapide por halti (1).

(1) *Vidu Farolo.*

La maniero de Montes por estoki estas tute rimarkinda pro la precizeco, la certeco kaj facileco de liaj ekbatoj ; vidante lin, ĉiu ideo pri danĝero malaperas : li havas tiom da kvieteco, li ŝajnas tiel certe prosperanta ke la batalo ŝajnas nur ludo. Estas neeble timi por lia vivo, li frapos la toron

kien li volos, kiam li volos, kiel li volos. La ŝancoj en la duelo estas malegalaj ; matadoro malpli lerta iafoje prezentas aspekton pli grandan pro la danĝeroj kaj ŝancoj, kiujn li riskas. Tio eble povas ŝajni vere delikata barbareco, sed la aficonantoj — ĉiuj kiuj vidis kurludojn kaj kiuj pasie ŝatis toron lojalan kaj kuraĝan — tre certe komprenos min.

La lastan tagon de la kurludoj fakto okazis kiu pruvos la verecon de la supre dirita netoleremeco, kaj montris iom maldolĉe al Montes ĝis kia grado la hispana publiko estas senpartia al la bestoj.

Belega nigra toro ĵus eniris en la redondelon. Pro la subita maniero laŭ kiu ĝi eliris el la torejo la spertuloj tuj havis bonan opinionon.

Ĝi havis ĉiujn kvalitojn de bona toro de batalo : ĝiaj kornoj estis longaj, akraj, kun la pintoj bone turnitaj ; ĝiaj kruroj sekaj, maldikaj kaj nervaj divenigis grandan lertecon ; ĝia larĝa brusto, ĝiaj vastaj flankoj montris grandegan forton. Tial oni nomis ĝin Napoleono, eble ĉar tio estis la sola nomo taŭga por ĝia nedisputebla supereco.

Ne ŝanceliĝante ĝi alkuris al pikadoro staranta apud la barilo, deĵetis lin kun lia ĉevalo, kiu restis morte frapita sur la sablo ; poste, antaŭensaltis al la dua pikadoro kiu ne pli bone sukcesis, ĉar apenaŭ oni havis sufiĉe da tempo por lin transigi super la barilo, tute difektita kaj kontuzita pro lia falo.

En la daŭro de kvarono da horo sep ĉevaloj ventreŝiritaj kuŝis sur la redondelo ; la mantelistoj nur de malproksime svingis siajn koloritajn mantelojn, ĉiam rigardante la barilon kaj transsaltante en la rondirejon tuj kiam Napoleono ekproksimiĝis al ili.

Montes mem ŝajnis iom ŝanceliĝanta, eĉ unufoje li metis la piedon sur la randon de la barilo, pretiĝante por ĝin supersalti, timante persekuton tro rapidan, kion li neniam estis farinta dum la du antaŭaj kurludoj.

La ĝojo de la ĉeestantoj vidiĝis el iliaj bruaj krioj, kaj la plej flatemaj komplimentoj por la toro elflugis el ĉiuj buŝoj. :

Nova ago de la besto grandigis la entuziasmon ĝis la lasta grado de la ekscitego. Sobresaliento de pikadoro — ĉar la du deĵorantaj estis jam forigitaj de la batalo — atendis, kun mallevita piko, la atakon de terura Napoleono kiu, ne atentante pri la pikvundo ricevita sur sia ŝultro, atakis la ĉevalon sub la ventro ; per unu kapbato levis al ĝi la antaŭajn krurojn ĝis super la barilo, kaj per dua bato sublevante al ĝi la postajon, superĵetis ĝin, kun ĝia rajdanto, trans la barilo, en la rondirejon.

Tia bela ago naskis tondron de aplaŭdoj, La toro estis estro en la loko, kiun ĝi trakuris kiel venkinto, amuziĝante pro manko de kontraŭuloj returni kaj reĵeti la kadavrojn de P'ĉevaloj, kiujn ĝi estis mortiginta.

La provizo da bestoj estis konsumita ; en la ĉevalejo estis plu neniu ĉevalo por doni al la pikadoroj. La banderistoj staris sur *las tablas* (barilo) ne kuraĝante iri por piki siajn sagetojn ornamitajn per paperoj sur la ŝultrojn de tiu timegiga batalanto, kies kolero tre certe ne bezonis ekscitigojn.

La ĉeestantoj malpacienigitaj de tiu interakto kriis : *Las banderillas! Las banderillas ! Fuego al alcade* (fajron al alkado, kiu ne donas la ordonon)! Fine, laŭ signalo de la Prezidanto, banderisto eliris el la grupo kaj pikis du sagetojn en la kolon de la furioza besto, kaj preterkuris laŭ sia tuta kapableco, sed ne ankoraŭ sufiĉe rapide, ĉar la korno tuŝetis al li la brakon kaj fendis la manikon.

Tiam, malgraŭ la krioj kaj la longdaŭraj protestoj de la popolo, la alkado ordonis la morton, kaj faris signon al Montes, por ke li prenu sian muleton kaj spadon, spite de la toromakiaj reguloj, kiuj postulas kvar parojn da banderiloj por ĉiu toro, antaŭ la lasta suerto.

Montes anstataŭ, kiel kutime, antaŭeniri ĝis la mezo de la redondelo staris je ĉirkaŭe dudek paŝoj de la barilo por : havi rifuĝejon en okazo de malfeliĉo ; li estis tre pala, kaj ne farante kelkajn el siaj ĝentilaĵoj, kiuj estas naskintaj por li la admiron de Hispanujo, li malvolvis la skarlatan muleton kaj citis la toron, kiu tuj alvenis. Montes faris tri aŭ kvar pasojn per la muleto tenante sian spadon same alta kiel la okuloj de la monstro, kiu subite falis kvazaŭ fulmofrapita kaj mortis post konvulsia salto. La glavo estis eniĝinta en ĝian frunton kaj pikinta la cerbon, faro

malpermesita de la toromakiaj leĝoj, ĉar la matadoro estas devigata pasigi la brakon inter la kornoj de la besto kaj ĝin frapi per estokado inter la nuko kaj la ŝultroj, kio pliigas la danĝeron por la homo kaj donas iom da ŝanco al la besta kontraŭulo.

Kiam oni komprenis la baton, ĉar tio ĉi estis okazinta rapide kiel penso, indignoplena hurao altiĝis de la *tendidos* ĝis la *palcos* kaj disiĝis kun bruega tumulto kaj frakaso neniam aŭdita. « Buĉisto, rabisto, mortigisto, ŝtelisto, ekzekutisto! » estis la plej dolĉaj krioj. « *Al Ceuta Montes !* al fajro Montes ! la hundojn al Montes ! » tiaj estis la krioj kiuj resonis de ĉiuj lokoj.

Neniam mi vidis similan furiozecon, kaj mi konfesas, ruĝiĝante, ke mi ĝin partoprenis.

Baldaŭ la kriegoj ne plu sufiĉis, oni ekĵetis al la malfeliĉulo ventumilojn, ĉapelojn, bastonojn kaj fragmentojn de elŝiritaj benkoj. Montes estis palega, lia vizaĝo verdiĝis pro furiozezo, liaj dentoj lasis sangajn markojn sur liaj blankaj lipoj, kvankam li ŝajnis tre kvieta kaj apogis sin kun afektita belmovo sur la tenilo de sia glavo, kies pinton ruĝigitan kontraŭ la reguloj, li estis viŝinta en la sablo.

Kio estas la popola amo :

Neniu estus povinta imagi, la hieraŭan tagon, ke artisto tiel ŝatata de la publiko povus esti tiel severege punata pro kritikinda ago, eble postulita de truda neceseco, se oni konsideros la maloportunan viglecon, fortegon, kaj rapidecon de tiu besto.

Fininte la kurludon, Montes iris sidiĝi en calesine, sekvita de sia kvadrello, kaj li forveturis ĵurante al si, ke li neniam plu remetos la piedojn en Malaga.

### 3 - TEKNIKA LEKSIKONO TOROMAKIA

ABANTA TORO. — Toro forkurema, senkuraĝa, unuvorte nebatalema

AFICONANTO. — (Hispane : *aficionado*). — Persono kiu pasie ŝatas la torajn kurludojn. La vera aficonanto estas ne nur ŝatanto sed precipe kompetentulo scianta difini la ecojn de la toroj kaj toreadoroj, la bonaĵojn kaj la malbonaĵojn dum la diversaj suertoj.

« Estas (diras *Sanchez de Neira*) multaj kategorioj de aficonantoj; unuj donas al si mem tiun titolon ĉar ili kelkafoje ĉeestas toran kurludon; ĉiuj pasoj estas tute same ŝatataj de ili kaj ili vidas la ricevitan rezulton pli ol la econ de ĝia efektiviĝo; ili estas nekapablaj distingi la staton laŭ kiu toro prezentiĝas, kaj scii ĉu ĝi estas en konvena farto; ili ŝatas malmulte la ĉefajn kvalitojn de toreadoro se tiu ĉi ne plenumas ian tro bravegan agon.

« Ekzistas ankaŭ aficonantoj, kiuj posedas kelkajn toromakiajn konojn, sed blindigitaj de siaj antaŭdecidoj, kaj malagrablaj ankaŭ pro tio ke ili bezonas laŭte montri sian kapablecon, ili ekstreme ŝatas kelkajn toreadorojn kaj laŭdas ilin eĉ pri iliaj malbonaĵoj, dum ili ne ŝparas senkompatajn kritikojn eĉ al majstroj, kiuj atingas la perfektecon.

« Tiuj ĉi du kategorioj de aficonantoj estas facile koneblaj; oni ne bezonas ilin vidi, sufiĉas ilin aŭdi dum la kurludo. Ili kriegas ĉiuokaze kaj senmotive: ili malkvietiĝas kaj moviĝas senĉese, laŭdas kaj kritikas troege, iĝante nerekoneblaj por siaj propraj amikoj pro sia agado simila al momenta frenezo ; ilia apudestado estas tre maloportuna.

« Sed fine ni prezentas la verajn aficonantojn, kiuj estas ne multenombraj. Tiuj ĉi sukcesis, dank'al longtempa kaj grava sperto, koni la torojn kaj iliajn kvalitojn, iliajn difektojn, la batalmanieron postulatan de ĉiuspeca besto, kaj la ĝustan gradon de sciado de ĉiu toreadoro. Sed malfeliĉe ili povas malofte eldiri sian opinion — pro la tujaj kontraŭdiroj de la junaj aficonantoj pri kiuj ni ĵus parolis.

« Estas, ni pensas, nenia afero en la mondo simila al demandoj pri toraj ludoj por naski partianojn netoleremajn kaj malĝentilajn; tial la diskutoj ĉiam estas tre malpacaj; estas do preferinde vidi, aŭdi kaj silenti, escepte se oni havos okazon interŝanĝi siajn impresojn kun persono senpartia kaj serioza; tiel agas la vera aficonanto.

« Plie li ne kontentiĝos vidante nur la kurludon; li ĉeestos ĉe la ĉevalprovo, ĉe la apartigado, kaj tiel li studos detalojn utilajn por ĝuste ŝati la diversajn partojn de la kurludo ».

**AGVANTA ESTOKO.** — Ĝi estas preskaŭ simila al la ricevanta estoko. La matadoro staras je ĉirkaŭe tri paŝoj antaŭ la toro, per muletmovo li citas la beston kiu tuj rekte kuregas al li; metante sian dekstran piedon malantaŭen kaj dekstren, la matadoro estokas la bruton en la momento kiam ĝi mallevas la kapon kaj sekvas la movon de la muleto kiu igas ĝin iri flanke de la majstro.

Ĉi tiu maniero estas unu el la plej malfacilaj kaj sekve malofte efektivigita.

**ALGVAZILO.** — (Hispane : *Alguacil.*) Rajdanto kies ofico estas disporti ordonojn de la Prezidanto. Dum la paseo la algvaziloj unuavice paŝas kaj ricevas de la Prezidanto la ŝlosilon de la toreja pordo.

**ALTA MULETPASO.** — Oni uzas tiun pason kontraŭ la toroj havantaj malfortajn aŭ tre lacajn krurojn, ĉar, en tia stato, toro kiu mallevus la kapon por trafi la muleton riskus fali sur la sablon de l'areno. Tial la matadoro faras altan muletpason levante la muleton antaŭ la nazo de la toro ĝis super ĝiaj kornoj; tiele la bruto donante kornbaton, levas sian kapon kaj ne riskas fali.

**ALTERNATIVO.** — Ago laŭ kiu matadoro kartela proklamas unu komencanton inda estoki toron, akceptante alterni kun li por mortigi la torojn dum la tiutaga ludo. Oni donas ordinaro la alternativon al matadoroj novicaj aŭ al sobresalientoj, kiuj sin montris kutime lertaj kaj kapablaj.

Por signi la alternativon, la ĉefspadisto armas la kandidaton per estokilo kaj muleto kaj donas al li de nun la rajton mortigi toron. Tio ĉi estas vera ceremonio.

**ANTAŬA ESTOKO.** — Tiu kiu trafas toron antaŭ la morelo.

**APARTIGADO.** — Post la elekto en la ganado kaj la aĉeto de la toroj batalontaj oni faras la apartigadon, t. e. ke oni apartigas, oni disigas la ses torojn elektitajn de la aliaj. Oni havas specialan kampon kun bariloj, poste specialan korton per kiu oni enirigas ĉiun toron en specialan kaĝon, skatolego en kiu ili ne povas moviĝi. Oni nomas ankaŭ apartigado la agon rigli en iliaj ĉikeroj la torojn batalontajn dum la sama tago.

**APLOMADA TORO.** — Tiu kiu estas laca kaj neagema ; ĝi staras preskaŭ senmove malgraŭ la instigoj de la toreadoroj ; sed iafoje ĝi subite antaŭenriras kaj tiel fariĝas danĝera.

**ARASTRO.** — Tuj kiam la toro estas mortigita, oni alkondukas apud ĝin ĉevalojn jungitajn triope — aŭ kelkafoje kvarope —, oni rapide alligas la trenatan ŝnuron al la kornoj de la toro kaj la ĉevaloj, direktataj de tri kondukantoj piedirantaj kuras tra la redondelo kaj, desegnante duonarkon fortrenas rapide la mortintan toron en la arastrejon. Tion ĉi oni nomas arastro.

Oni same fortrenas la mortintajn ĉevalojn.

**ARASTREJO.** — Loko en kiun oni altrenas la torojn aŭ ĉevalojn mortigitajn dum la lidio. Tie la toroj estas tuj senhaŭtigataj kaj pretigataj de buĉistoj por buĉvendejo.

**ATRAVESADA ESTOKO.** — Estoko estas atravesada kiam la estokilo enpenetras oblikve laŭ malbona direkto en la korpon de la toro, kaj ĝia pinto iafoje eliras el la kontraŭa flanko.

**BALESTA PUNTELO.** — La balesta puntelo estas kelkafoje efektivigata de lerta matadoro. Kiam la toro estas bone estokita, kaj tamen ne kuŝiĝas regule, la matadoro uzas la deskabelon; sed krom la ordinara deskabelo la majstro povas uzi la balestan puntelon. Prenante ordinaran puntelon, li sin metas proksime de la kapo de la toro kaj ĵetas la puntelon tiele, ke ĝi trafas per sia pinto la toron inter la du kornoj kaj interniĝas en la cerbeton; kiam tiu faro sukcesas la toro falas kvazaŭ fulmofrapita.

**BAJA ESTOKO.** — Malbona estoko, kiu trafas toron en la kolo apud la kapo malsupre de la morelo.

**BANDERILO.** — Bastoneto longa je 75 centimetroj ornamita per paperoj diverskoloraj havanta je sia ekstremaĵo feran pinton harpunaforman; regule, la banderiloj estas pikataj sur la morelon.

La fajrbanderiloj enhavas sistemon de petardoj, kiuj ekflamiĝas dum la pikado kaj tiel eksplodas, brulas kaj ekscitas la toron. Oni uzas tiun punon nur por la toroj tro abantaj aŭ



forkuremaj kiuj ne volas ricevi almenaŭ tri pikegojn.

BANDERI. — Piki paron da banderiloj sur la morelon de la toro. Laŭ la maniero uzita de la banderisto, la enmetado ricevas la nomojn de bandero : kvartea, rekorta, relanca, duonturna, kiebra.

BANDERISTO. — Toreadoro kiu trafas — kaj ornamas — la toron per banderiloj.

BANDERO. — Ago fiksi banderilojn kun ĝiaj diversaj preparadoj.

BARILO. — Ligna altstara zono ĉirkaŭanta la redondelon, trans kiu rifuĝas la toreadoroj persekutataj de toro

BECERADO. — Toroludo por junaj toreadoroj, dum kiu oni estokas nur becerojn.

BECERO. — Toro kiu ne estas ankoraŭ kvarjara.

BEREDO. — Ronda plata ĉapo el drapo.

BREGO. — Oni nomas tiel la tutan labormanieron de la toreadoro.

BRINDO. — Antaŭ la mortigo de la toro, la matadoro sin turnas al la publiko, ordinare al la Prezidanto, kaj laŭte elparolas sian saluton. su paroladon oni nomas: brindo.

BRUSTA PASO. — Muleta paso farata de la matadoro jene: li profiliĝas ĝuste antaŭ la besto (kutime la matadoro prezentas al la toro sian maldekstran flankon); tiel starante, li citas la bruton, kiu sin alĵetas — sed la matadoro, nemovigante siajn piedojn — prezentas la muleton kaj movas ĝin pasigante la toron antaŭ sia brusto tiamaniere ke la besto donas la kapobaton proksime de la brusto . de la matadoro kaj iom poste, ĉe la dekstra flanko.

ĈIKERO. — Serio de malgrandaj loĝejoj, ĉe la torejo, en kiuj oni riglas aparte ĉiun toron antaŭ la kurludo; tiuj loĝejoj ricevas lumon nur de supre.

CITI. — Allogi la atenton de la toro tiele ke la besto alkuras al sia kontraŭulo.

ĈULO. — Viro kiu faras la diversajn servojn en la areno dum la lidio, t. e. malfermi torejan pordon, gvidi ĉevalojn de la pikadoroj, rasti sablon en la redondelo k.t. p. Antaŭe oni donis ankaŭ tiun nomon al la mantelistoj mem.

ĈEVALPROVO. — La tagon antaŭ la toraludo, la pikadoroj elektas mem siajn ĉevalojn, kaj rajdante ilin provas . ĉu ili havas la necesajn kvalitojn. La pikadoro povas rifuzi netaŭgajn ĉevalojn. Sekve, dum la kurludo, pikadoro rajdanta ne plu havas la rajton forlasi sian ĉevalon, pretekstante ke ĝi estas malbona. Tiu faro estus grave punata.

DEKSTRA MULETPASO. — Ĝi estas farata kiel la natura paso sed tenante la muleton per la dekstra mano.

DELANTERA ESTOKO. — La estoko estas delantera kiam la estokilo trafas la toron tro antaŭe, t. e. pli proksime de la kapo ol de la kruco.

DESKABELO. — Ifoje la toro, kvankam bone trafita per estokilo daŭrigas longe staradi. Tiam la matadoro taŭge uzas la deskabelon. Por ĝin efektivigi la matadoro sin metas antaŭ la kapo de la toro, kaj per la pinto de sia estokilo pikas la nazon de la besto por ke ĝi mallevu sian kapon kiel eble plej multe; poste la majstro apogas la pinton de la estokilo inter la du kornoj, levas la brakon kaj enigis la akran feron en la cerbeton ; tuj la toro falas.

Tiun ĉi suerton oni povas efektivigi nur kiam la toro staras senmove ; sed kelkafoje la besto per lasta potenca ekpeno sin alĵetas rapide al la matadoro. Tiel estas mortigita la fama matadoro « Espartero ».

DUONESTOKO. — Matadoro efektivigas duonestokon kiam la estokilo eniras en la toran korpon nur duone.

**DUONTURNO.** — Oni enmetas banderilojn aŭ estokilon duonturne laŭ la jena maniero :

La toreadoro staras malantaŭ la toro altiras ĝian atenton citas ĝin kaj dum la returniĝo de la besto li kuras laŭ duonrondo kaj internigas banderilojn aŭ estokilon en la morelon. La duonturno estas uzata iafoje por bandero sed malofte por estoko ĉar ĝi estas senmerita. Tia estokmaniero taŭgas nur por trodanĝera toro.

**EMPAPRI.** — Meti muleton aŭ mantelon sur la kapon de la toro, tiamaniere ke ĝi ne povu vidi sian kontraŭulon.

**ESTOKI.** — Mortigi toron per spado laŭ la toromakiaj reguloj.

**ESTOKILO.** — Armilo, glavo per kiu matadoro estokas. Tiu ĉi glavo havas ŝtalplaton 75 centimetran ; la tenilo kiu havas ne pli ol 5 centimetroj estas vindita per lano por faciligi la tenadon. La matadoro neniam forgesas trempi novan estokilon en sangon de toro antaŭ ol uzi ĝin por la unua fojo.

**ESTOKO.** — Laŭ la maniero kiel estokilo frapas toron, oni nomas la estokon : antaŭa, atravesada, baja, kaida, goleta, kontraŭa, duona, delantera, honda, sobrada, tendida, k. t. p.

**FAJRBANDERILO.** — (Vidu : Banderilo.)

**FAROLO.** --- Mantela paso simila al *veroniko* ; sed kun tiu aldono, ke la matadoro finas ĝin metante la mantelon per la samo movo, sur siajn ŝultrojn.

**GALEO.** — Bona mantela paso. La toreadoro metas la mantelon nature sur siajn ŝultrojn kaj movante la korpon pasigas la toron flanke kaj preskaŭ apud li. Oni ordinare faras tiun pason dum kito.

**GANADO.** — Brutaro de bovoviroj, nutrataj en vastaj herbejoj dum almenaŭ kvin jaroj kaj bredataj speciale por toroludo. Kelkaj ganadoj estas tre famaj pro siaj bestoj tre fortikaj kaj sovaĝaj, kun kornoj longaj kaj akraj. Ĉiu ganado havas sian devizon, t. e. siajn kolorojn montratajn per aro de rubandetoj pikita sur la ŝultroj de la toro. antaŭ ol enigi ĝin en la redondelon.

**GOLETA ESTOKO.** — Ĝi estas pli malbona ol la baja. La estokilo trafas la toron ĉe la malsupro de la kolo, ĉe la brusto, kaj eniras en la korpon trairante la pulmon ; la morto estas preskaŭ ĉiam tuja. Tiu ĉi estokmaniero estas tute malpermesita kaj malhonoras veran matadoron.

**HONDA ESTOKO.** — Profunda estoko ; la estokilo eniĝas tute en la korpon de la toro. Estas tre supera estoko, kiam ĝi estas honda kaj trafas en la krucon.

**JURIDICIO.** — Loko, parto de la redondelo okupata de loro kaj de la toreadoro kiam ili sin renkontas unu la alian. La toro eniras en juridicion kiam ĝi sin ekĵetas al la toreadoro kaj eliras el juridicio kiam ĝi preteriras la toreadoron, — kaj reciproke por la toreadoro.

**KABESTRO.** — Hejma bovo, kiu helpas por rekonduki toron de la areno en la torejon, kiam okaze ĝi ne estas mortigita. La kabestro estas precipe uzata ĉe la francaj kurludoj.

**KAIDA ESTOKO.** — La estoko estas kaida kiam la estokilo, malmulte penetrante kliniĝas pro sia pezo tiel ke ĝi prenas pozicion pli horizontalan ol vertikalan.

Kiam la estokilo estas preskaŭ horizontala kaj tute eniĝinta, la estoko estas nomata tendida.

**KAMBIA MULETPASO.** — La matadoro, flanke de la toro prezentas al ĝi muleton kaj pasigas la beston je sia dekstro levante la muleton super la kapo de la toro, tiamaniere ke tiu ĉi iras okupi la lokon sur kiu staris la matadoro kaj reciproke.

**KARTELA MATADORO.** — La matadoro novica ricevas titolon de matadoro kartela kiam li estas ricevinta alternativon de alia matadoro kartela. Kompreneble oni donas tiun ĉi gradon nur al la plej lertaj kaj kuraĝaj. La matadoroj kartelaj ne estas multenombraj (21 en 1908).

**KAVALIRO EN PLAZO.** — Rajdisto armita per rejonilo, kiun li internigas per la pinto en la morelon ; tiam, rompante la tenilon en ĝia meza parto, li lasas nur duonon de la rejonilo fiksitan sur la morelo. Tiu ĉi laboro estas malfacila kaj tute diferenca de la laboro de pikadoro. Plie la ĉevaloj de la rejonistoj, tute nesimilaj al tiuj de la pikadoroj, estas belaj, fortaj, speciale breditaj kaj sekve multekostaj. Ĉi tiu suerto estas praktikata precipe dum la portugalaj kurludoj, sed en tiuj ĉi ludoj la toroj estas ŝirmumaj.

**KERENCO.** — Loko kelkafoje elektata de la toro en la redondelo, sur kiun ĝi reiras ofte kaj restas prefere. Tiam estas malfacile forigi ĝin el tiu loko. Ekzistas la ordinara kerenco kiu estas apud la toreja pordo kaj la okazaj kerencoj sur aliaj lokoj en la redondelo (ofte apud mortinta ĉevalo).

**KIEBRO.** — Flekso de korpo per kiu, ne movante la piedojn, oni evitas kornbaton. La enmeto de banderiloj kiebre estas unu el la plej meritaj kaj plej elegantaj manieroj. Gordito ĝin efektivigis la unuan fojon en 1859. La toreadoro, kun la kalkanoj apudmetitaj staras malproksime, ĝuste antaŭ la toro; li citas la beston kaj tenante banderilojn iom flanke klinas la superan parton de sia korpo prezentante ĝin al la toro kiel celon. Tuj kiam la toro alvenas al li kaj mallevas la kapon por lin frapi, la banderisto sin relevas kaj pikas la banderilojn nemovante la piedojn, dum la bruto kapbatas la lokon sur kiu ĵus estis la supera parto de la korpo de la toreadoro. Oni plenumas ankaŭ similan suerton sur seĝo. La banderisto sidiĝas sur seĝon kaj faras la saman agon kiel supre montrite, sin relevante kiam la toro alvenas al li, tiamaniere ke la kornbato trafas nur la seĝon.

**KITO.** — Interveno de matadoro por savi senarmigitan pikadoron dum la suerto de pikegado. Ofte, per siaj kornoj, la toro renversas ĉevalon kaj ĝian rajdanton ; la pikadoro tenata sub sia ĉevalo estas en danĝero, sed la vigla matadoro tuj metas sian mantelon antaŭ la nazon de la toro, altiras al si mem la atenton de la besto kaj ĝin malproksimigas de la falintoj.

**KONTRAŬA ESTOKO.** — Tiu kiu trafas la maldekstran flankon de la toro.

**KRUCO.** — Loko, ĉe la supraĵo de la toro, formita per renkontiĝo de la linio plilongigita de la ŝultroj, kun la linio de la spino.

**KURLUDO.** — (Vidu toroludo.)

**KVADRELO.** — Ĉiu kvadrello konsistas el unu matadoro, unu sobresaliento, du aŭ tri banderistoj aŭ mantelistoj, kaj du pikadoroj. Unu kurludo necesigas ordinaro du kvadrellojn, t. e. du matadorojn kun iliaj helpantoj.

**KVARTEA.** — Tiu ĉi maniero piki banderilojn estas la plej ofte uzata. La banderisto sin metas je taŭga distanco antaŭ la besto, altiras ĝian atenton kaj tuj kiam ĝia rigardo al li sin turnas, kuras al ĝi — ne rekte sed desegnante duonrondon ; en sia irado li renkontas la toron ; en tiu momento la toro mallevas la kapon por doni kornbaton, tiam la banderisto faras tre mallongan halton, fleksante sian korpon. Kiam la toro levas la kapon por frapi, li fiksas regule banderilojn kaj preterpasas.

**KVITA TORO.** — Kiam la toro ne plu kuregas tra la redondelo kaj nur atakas la kontraŭulojn starantajn je negranda distanco, ĝi estas kvieta.

**LARGO.** — Mantela paso larĝe farita. La mantelisto tenas nur randon de la mantelo per unu mano kaj malvolvas ĝin tute laŭlonge antaŭ la kuranta toro.

**LEVANTADA TORO.** — Kiam la toro tenas alte la kapon kaj kuregas senhalte tra la tuta redondelo, ĝi estas levantada. Tio estas la unua stato en kiu toro sin trovas kutime tuj kiam ĝi eliras el la torejo.

**LIDIO.** — Ludo, batalo. Oni uzas ofte tiun vorton parolante pri la kurludo. Oni diras ekzemple : « La ĉefspadisto bone direktis la lidion. »

MAJSTRO. — Nomo donata al lerta kaj jam fama matadoro.

MALANTAŬA ESTOKO. — Tiu, kiu trafas toron post la morelo.

MANTELADI. — Efektivigi diversajn mantelapasojn.

MANTELAPASO. — Ĉiu paso farata per mantelo.

MANTELO. — Mantelo hispana, kies unu flanko estas ordinare ruĝkolora. Ĉiu toreadoro havas sian bregamantelon (mantelo de laboro) kaj sian luksan mantelon ; tiu ĉi lasta — ĉiam multekosta, — ornamas lin dum la paseo.

MATADI. — (Vidu estoki.)

MATADORO. — Treadoro kiu havas rajton estoki toron dum la kurludo. Ekzistas du kategorioj de matadoroj : la matadoro novica, kiu estokas nur becerojn en toroludoj nomataj novicadoj, kaj la matadoro kartela. Por ricevi la enviitan titolon de matadoro kartela, la toreadoro devas esti akceptita per ceremonio nomata *alternativo*. La matadoro kartela ofte nomata majstro, ne nur devas esti lerta kaj kuraĝa sed precipe devas havi plenan sciadon pri toromakio.

MONTERO. — Nomo de speciala kapvesto de toreadoro.

MORELO — Dikaĵo sur la supra parto de la kolo de la toro, inter la ŝultroj; la morelo estas ĉiam celata ĉu de la pikadoroj, ĉu de la banderistoj.

MULETO. — Peco da ruĝa ŝtofo, streĉita per bastono, uzata de la matadoro dum la lasta suerto.

MULETAPASO. — Pasoj farataj de la matadoro per muleto; laŭ la maniero plenumi ilin, ili nomiĝas : paso natura, dekstra, rondforma, alta, kambia, brusta, k.t.p.

NATURA MULETPASO. — Ĝi estas efektivigata de matadoro tenanta muleton per maldekstra mano. La toro citita eniras en juridicion kaj tiam la matadoro per muletamovo pasigas la toron maldekstren, levante la muleton super ĝia kapo.

NAVARESO. — Mantelapaso. - La toreadoro starante sufiĉe proksime de la toro, kaj tenante la mantelon kiel por veroniko, incitas la beston, kiu tuj kuras al sia kontraŭulo. Sed la toreadoro movadas la mantelon flanken kaj malalten ĝis sub la nazo de la toro, tiamaniere ke la mantelo faras duonrondon, kaj same la toro, sekvanta la movon, faras ankaŭ duonrondon, kies centro estas la mantelista. Oni uzas la navareson kontraŭ toroj forkuremaj, kiuj tiel estas allogataj por resti en juridicio.

NOVICA. — (Vidu matadoro.)

NOVICADO. — Toroludo por matadoroj novicaj aŭ por nemetiistoj. Ordinare oni uzas en tiu okazo nur becerojn kaj ankaŭ kelkafoje ne ĉeestas pikadoroj.

PASO. — Ago laŭ kiu toreadoro igas toron preterpasi flanke de li.

PASEO. — Eniro, promeno kaj prezento de la kvadreloj en la rondelo antaŭ la ludo. Unuavice iras du rajdantoj nomataj algvaziloj, poste la du aŭ tri matadoroj kartelaj kaj iliaj kvadreloj kun pikadoroj, fine la jungitoj de arastro.

PAŜO DE BANDERILOJ. — Estokado estas nomata “ al paŝo de banderiloj ” kiam la matadoro ekirante de malproksime kuras al la toro kaj trafas la bruton bone aŭ malbone, kiel li povas ; tio iom similas la enmeton de banderiloj al kvarteo. La matadoro uzas ĝin malofte kaj nur kiel estokon rekursan.

PENDTUFO. — Kunplektita tufeto da haroj, kiun toreadoro lasas kreski malantaŭ sia kapo, pendanta sur lia nuko. Ĝi estas la speciala signo de la metiisto.

PIKADORO. — Treadoro rajdanta ĉevalojn ordinare malbonajn laj preskaŭ neuzeblajn. La pikadoro estas vestita per vesto tute speciala ; liaj kruroj estas vinditaj de longa pikegilo per kiu li

pikas la toron sur ĝia morelo, kaj tiel penas kaj provas haltigi la beston, ŝirmante sian ĉevalon kontraŭ kornado.

PIKEGADO (SUERTO DE) — Unua parto de kurludo, rezervita al pikadoroj, konsistanta en pikado de toroj por ilin lacigi kaj kvietigi. Tiu ĉi unua suerto estas la plej kortuŝanta kaj havas grandan influon sur la ceteron de la kurludo ; tial la prezidanto devas zorge atenti pri la kvalito kaj karaktero de ĉiu batalanta toro.

PIKEGI. — Trafi toron per pikegilo.

PIKEGILO. — Pikstango, armilo de pikadoroj. La pikegilo estas ordinaro longa je 2 metroj 60 centimetroj. La pinto estas fera, triangula, longa je 23 milimetroj kun diametro je 8 aŭ 9 milimetroj, kaj havas elipsan formon (kiel turnludilo).

PINĈAZO. — Pikkvundo dum estokado. Estoko estas nur pinĉazo kiam la estokila pinto, renkontante oston, ne povas eniri kaj nur pikas la toron. Ordinaro tio signifas ke estoko bone trafis, proksime de la kruco; tial oni aplaŭdas ĉiam tiun fakton. La pinĉazo me estas kalkulata en la nombro de estokoj ricevitaj de toro.

PLAZO. — Ĉiu speciala konstruaĵo por toraj kurludoj — ne nur la areno en kiu oni batalas sed ankaŭ la tuta konstruaĵo ĝis la eksteraj muroj.

POSTEFLANKA PASO. — (Hispane : *Frente por detras*). — La toreadoro efektivas tiun ĉi pason starante antaŭ la toro kaj prezentante al ĝi la dorson. Sur siaj ŝultroj la toreadoro sternas mantelon, per siaj brakoj ; kiam la bruto ekkuras, li movas la mantelon flanken tiamaniere ke la toro sekvas la movon de la mantelo, post kiu mantelo kaj toro sin trovas antaŭ la mantelisto.

PROFILIĜI. — (Hispane : *perfilarse*). — Stari antaŭ la toro, ne prezentante la bruston sed profile (oni prezentas ordinaro la maldekstran flankon).

PUJAZO. — Kiam la pikegilo trafas toron sur oston, kaj tiel ne eniras sufiĉe oni nomas la trafon pujazo. Tio estas kvazaŭ pinĉazo per estokilo.

PUNTELISTO. — (Hispane : *puntillero* aŭ *cachetero*). — Toreadoro kies ofico estas punteli la toron por fini ĝian mortigon. Ordinaro la sobresaliento plenumas la oficon de puntelisto.

PUNTELI. — Trafi toron inter la du kornoj, en la cerbeton, per puntelilo post estokado. Kiam toro estas morte vundita per estokilo de matadoro ĝi kelkafoje falas tuj, tute malviva ; tiam la helpo de puntelisto estas senutila. Sed pli ofte, la toro ŝanceliĝas sur siaj kruroj kaj kuŝiĝas teren, tenante alte sian kapon, kvazaŭ ĝi atendus la morton. En tiu okazo matadoro plu ne havas rajton tuŝi la mortvunditan beston (escepte se la toro releviĝus). Le puntelisto tiam sin metas malantaŭ la kapon de toro kaj internigas puntelilon en la cerbeton; la bruto tuj sterniĝas senmove.

RAZEDISTO. — Franca toreadoro uzanta la razedon.

RAZEDO. — Dum la francaj kurludoj, oni nomas razedo la agon laŭ kiu toreadoro kuranta proksimiĝas al toro preskaŭ sammaniere kiel por la hispana kvarteo — aŭ pli ĝuste kiel por “ al paŝo de banderiloj ”. — Sed multe pli rapide, kaj ne kun simila eleganteco, ĉar tie ĉi la toro estas multe pli malfacile batalebla.

REDONDELO. — Centra parto de areno — ĉirkaŭita per barilo — en kiu oni batalas, sur sablo.

REJONI. --- (Hispane : *rejonear*). — Fiksi rejonilojn laŭ toromakiaj reguloj.

REJONILO. — Speco de pikegilo aŭ sagego uzata de kavaliro en plazo ; tiu ĉi armilo longa je ĉirkaŭ tri metroj estas el maldika ligno, ĝia supra duono estas malmoligita per fajro kaj tiel rigidigita ; tial kiam la kavaliro internigas ĝian pinton banderilforman en la toron la maldika ligno facile rompiĝas kaj nur la ekstrema parto de la armilo restas fiksita en la vundo — kiel simpla banderilo — la alia parto restas en la mano de la rejonisto.

REJONISTO. --- (Hispane : *rejoneador*). — Samsenca kiel “kavaliro en plazo”.

REKORTO. — La toreadoro — ĉu sen mantelo, ĉu kun mantelo volvita ĉirkaŭ la brako — staras antaŭ la toro, kaj tuj kiam la besto alvenas en juridicion li faras unuan movon metante sian kruron dekstren, kaj tuj duan movon metante la saman kruron maldekstren, tiam li fleksas la korpon, evitas la kornbaton kaj eliras laŭ kontraŭa direkto.

REKURSA ESTOKO. — Oni uzas ĝin kontraŭ toroj danĝeraj aŭ neregulaj, ĉu kiam ili ne volas antaŭkuri, ĉu kiam ili sin tenas en kerenco, ĉu kiam ili forkuras, k. t. p. La precipaj estokoj rekursaj estas : al duonturno kaj al paŝo de banderiloj.

RELANCE. — Oni uzas tiun ĉi esprimon kiam toreadoro — farinte pason — tuj rekomencas alian pason, kiun oni ne atendis aŭ ne antaŭvidis pro lerta nova atako de la toro. Ankaŭ oni banderas relance, kiam la toro post ricevo de banderiloj, saltegas pro doloro ; tiam alia banderisto alkuras al ĝi kaj senprokraste fiksas alian paron da banderiloj.

RICEVANTA ESTOKO. --- (Hispane : *al recibir*). — Laŭdinda maniero estoki toron.

Por ĝin efektivigi, la matadoro elektas momenton, kiam lia kontraŭbatalanto havas la antaŭajn piedojn vice, kaj la korpon rekte. La majstro: staras antaŭ la besto, kun dekstra brako eksterflanke, la korpo profiliginta, la estokamano meze de la brusto, la spada pinto celanta la lokon frapotan ; li metas la maldekstran brakon (tenante la muleton) kiel por brustapaso, kaj volvas la ŝtofon por ne embarasiĝi en ĝi; en tia starado li citas la toron, lasas ĝin alveni en juridicion; tuj kiam la besto mallevas la .

kapon por alfrapi — li trafas ĝin, dum per movo de muleto – nur de muleto – li igas malrektiranta.

Tiu ĉi estokmaniero estas la unua per kiu oni mortigis torojn kiam oni ekuzis estokon, en la 1796a jaro. La vera kaj pura estoko ricevanta devas esti plenumita de la maladoro ne movante la piedojn ; li devas stari sur la loko mem sur kiu li elvokas kaj trafas la toron kiun li ricevas kaj sin liberigi de sia kontraŭulo per movo de muleto. Kompreneble ĝi ne estas ĉiam pure efektivigita.

RONDFORMAJ MULETPASOJ. — La majstro faras du aŭ pli intersekvajn pasojn per muleto, tiel ke la toro desegnas ĉirkaŭ li rondon, dum la matadoro ne foriras de la centro.

RONDIREJO. — Koridoro inter la barilo kaj la muro kontraŭbarila, kien toreadoroj persekutataj de toro povas rifuĝi.

SAMTEMPA ESTOKO. — Ĝi okazas kiam toro kaj toreadoro ekiras unu kontraŭ la alian en la sama momento.

SENARMIGO. — Fariĝas senarmigo kiam, dum la brego de muleto, la toro forportas la trastilojn el la mano de la toreadoro.

SENTIDA TORO. — Oni tiel nomas toron kiu ŝajnas flari la homan korpon tra la mantelo. Tial ĝi ne lasas. Sin trompi per la movo de la mantelo kaj ofte alkuras rekte kaj kornadas toreadorojn — sekve ĝi estas danĝera. Ĝi ankaŭ ne proksimiĝas facile al la pikadoroj.

SOBRESALIENTO. — Treadoro kiu akompanas matadoron kaj eĉ anstataŭas lin, se okaze ĉiuj matadoroj de la kurludo estas vunditaj. Sobresaliento prenas estokilon nur se en la areno neniu matadoro povas toroludi.

SOPRADA ESTOKO. — Tiu, kiu trafas la beston kiel la kontraŭa kaj, plie, kiel la malantaŭa.

SPADO. — Alia nomo de la estokilo ; per plilarĝigo de vortsenco ofte oni uzas tiun vorton por nomi la matadoron mem. La primaspado (unua spado) aŭ ĉefspadisto estas la plej malnova matadoro de la kurludo ; li havas la rajton estoki la unuan toron kaj ankaŭ direktas la lidion.

SUERTO. — Ago, fakto, parto de la laboro. Per plilarĝigo de la senco de la vorto oni nomas suerto ĉiun laboron efektivigitan en la redondelo. Tial oni diras ke la lidio dividiĝas en tri suertoj aŭ terciroj : la suerto de pikegado, la suerto de banderado kaj la suerto de estokado.

ŜIRMUMA TORO. — La toro estas ŝirmuma, kiam la pintoj de ĝiaj kornoj estas vinditaj per kaŭĉuka ingo bulforma. Tiel la kornbatoj estas multe malpli danĝeraj.

TENDIDA. — (Vidu Kaida).

TONDI LA PENDTUFON. --- (Hispane : *Cortarse la coleta*). — Kiam matadoro ne plu volas daŭrigi sian profesion, li kunigas siajn amikojn kaj — ceremonie — tondigas sian plektitan pendtufon (tiu ĉi pendtufo estas distingiga ornamo de la toreadoroj). Tondi la pendtufon signifas do : forlasi la toreadoran profesion.

TOREADORO. — En hispana lingvo la nomo *toreador* estas uzata por nomi aficonanton, kiu laŭ sia ludamo kelkafoje batalas en arenoj kontraŭ torojn aŭ becerojn ; toreadoro estas nemetiisto.

La metiiston oni nomas *torero*; sed mi opinias ke, en Esperanto, ni devas forlasi la vorton *torero* kaj uzi nur la vorton *toreadoro*, ne nur ĉar nuntempe oni ne plu vidas nemetiiston batali kontraŭ torojn, sed precipe ĉar la vorto toreadoro estas uzata universale por nomi veran metiiston.

TOREJO. --- (Hispane : *Toril*). — Loĝejo en kiun oni enirigas torojn antaŭ ol rigli ilin po wnu en ĉiun ĉikeron. Ĉikeroj estas entenataj en la torejo.

TORO. — Bovoviro speciale nutrita kaj bredita por la toroludo. La toro de batalo devas esti kvinjara ; ĝian edukadon oni faris en specialaj ganadejoj. Toro malpli ol. kvinjara estas nur becerero.

TOROLUDI. --- (Hispane : *Torear*) toromakiaj reguloj.

KURLUDO aŭ TORA KURLUDO (Hispane : *Corrida de toros*). — Prezento efektiva en areno, dum toreadoroj batalas, laŭ la toromakiaj reguloj.

TOROMAKIO. — Arto batali kontraŭ torojn; ĉio, kio pritraktas la toroarton.

TRASTI. — Labori per muleto por prepari toron al la ricevo de estoko.

TRASTILOJ. — Muleto kaj spado.

VERONIKA PASO. — Paso de mantelo. La matadoro sin metas antaŭ la toro, ne tro malproksime. Per movo de brakoj, li ĉitas la beston, kiu tuj alkuras al li; tiam li malfaldas la mantelon, tenante ĝin per la supraĵo (kiel Sankta Veroniko tenanta la sanktan tolaĵon), lasas alveni la toron en juridicion, poste per movo de brakoj igas la toron preterpasi flanke — dekstre aŭ maldekstre. La toreadoro penas efektivi tiun movon tiel ke la toro sekvas la ŝtofon kaj ne foriras malproksimen, for de la juridicio ; tiam la toro returniĝas kaj estas preta por nova paso. Tamen se toro estas forkurema, la mantelisto prefere uzas la navareson.

VOLAPIEDA ESTOKO. — Ĝi estas la plej uzata maniero por mortigi toron, precipe kiam la besto estas regule aplomada. La toreadoro staras proksime de la toro, profiliĝas, direktas sian spadon, kaj sin ĵetas al la bruto; en la sama momento li movas la muleton dekstren sub la nazo de la toro kaj kiel eble plej malsupre; sekve de tiu movo la toro mallevas la kapon kaj la matadoro trafas ĝin tuj per estokilo — en la krucon se eble — kaj foriras.

**FINO**